# Joanne kaj la melburnanoj

**INTERVJUIS: KATJA STEELE (ADELAJDO)**



*Joanne Johns komencis lerni Esperanton en 2013. Ekde tiam ŝi partoprenis somerkursarojn en 2014, 2015, 2017 kaj 2019 kaj ekaktivis en Melburno organizante la tieajn Meetup-kunvenojn, dimanĉajn renkontiĝojn de esperantistoj, kaj ludvesperojn. Ĉiulunde ŝi iras al la E-kunvenoj, zorgas pri la retaj informoj, gajnis la TEJO-konkurson pri la emblemo de la IJK (2015), iĝis teknika redaktanto de ESK (2014-nun), iĝis estrarano de AEA (2014-2017) kaj dume ĉiam pli kaj pli flue parolis Esperanton. En 2017 ŝi iĝis la prezidanto de la Melburna Esperanto-Asocio. Intertempe ŝia partnero Peter ankaŭ esperantistiĝis kaj akompanas kaj helpas Joanne en multaj manieroj.*

**K: Ĉu ne pezas sur vin la tasko esti prezidanto?**

J: Mi faris miajn agadojn proprainiciate antaŭe kaj mi daŭrigas la saman agadon kun la "titolo" prezidanto. Aldoniĝis nur unu jarkunveno.

**K: Kiuj estas la aliaj membroj de la estraro?**

J: La vicprezidanto estas Tristan Mcleay (kiu verŝajne transloĝiĝos al alia lando), kasisto Heather Heldzingen, sekretario Esther Parris, bibliotekisto Peter Johns.

**K: Vi havas eĉ du klubajn kunvenojn semajne!**

J: Lunde en Ross House kutime renkontiĝadas la fluparolantoj kaj tien ni direktas ankaŭ la eksterajn vizitantojn. Ni teumas, tradukas librojn en Esperanton kaj libere interbabilas. Ĝis eble antaŭ unu jaro ni havis tie sufiĉe multajn homojn, sed intertempe kelkaj el la fideluloj transloĝiĝis. La dimanĉa renkontiĝo en kafejo ACMI en Federation–placo, kiu lastatempe pligrandiĝas, estas reklamata precipe por komencantoj, sed de tempo al tempo venas al ĝi ankaŭ kelkaj fluparolantoj. Mi neniam scias, kiom da homoj aperos. Diversaj ludoj kaj iom da instrumaterialo ĉiam estas ĉemane kaj mi uzas ilin laŭnecese.

**K: Kiamaniere vi trovas tempon por tiom da esperantumado?**

J: Ĝis 2017 mi havis nur parttempan laboron, do restis spaco por multaj aliaj aferoj. Sed tiam la patrino de Petro grave malsaniĝis kaj ni ofte flugis al Brisbano por esti kun ŝi. Por replenigi mian monujon mi devis trovi plentempan laboron, sed tio forprenis multe de mia antaŭe libera tempo. Por havi pli da tempo mi rezignis pri la AEA-estraraneco kaj ĉesis fari apartajn ludvesperojn.

**K: Kiujn aranĝojn de la melburna grupo vi elstarigus?**

J: La plej populara estas la Zamenhof-festo organizata kutime de Heather Heldzingen. Ni kunportas al ĝi manĝaĵojn kaj prezentas diversajn programerojn. Antaŭ du

jaroj ni havis sukcesan kradrostadon honore al la centa datreveno de la morto de Zamenhof. Tra la jaro mi kaj la MEA-anoj penas organizi almenaŭ kelkajn ekskursojn kaj komunajn vespermanĝojn en restoracioj.

**K: Kio pri Meetup?**

J: Mi registris ĉirkaŭ 1200 homojn, kiuj esprimis pere de Meetup intereson pri Esperanto, sed al la kunvenoj venas nur 5 ĝis 15 el ili.

**K: Ĉu la melburnanoj uzas sian bibliotekon?**

J: Malofte. Pli la komencantoj ol la progresintoj. Mi imagas propran E-domon, ne luitan ejon kiel nun, kie la libroj estas ĉiam videblaj, tuŝeblaj, prunteblaj.

**K: Malgraŭ ĉio kion vi jam faras por Esperanto, vi surprizis nin ĉiujn per kreo de muzikbando EKDE TIAM kaj faris vian unuan, tre sukcesan publikan koncerton, dum la ĉi-jara somerlernejo en Adelajdo. Gratulon al vi!**

J: Dankon! Mi muzikumas kun mia partnero Petro. Li ludas tamburojn, mi estras la elektrajn ilojn, verkas la tekstojn kaj kantas.

**K: Ĉu vi intencas ludi kaj esperante kaj angle?**

J: Ni volas esti nur E-bando kiu, espereble, portos sian muzikon al multaj E-aranĝoj de la mondo kaj ankaŭ muzikumos al la ĝenerala komunumo en Aŭstralio.



## Kiel vi fartas – 3zzz?

**INTERVJUIS: KATJA STEELE (ADELAJDO)**

*Tiuj, kiuj aŭskultadas la Esperantlingvajn elsendojn de la Melburna radiostacio 3zzz bone konas la voĉon de Franciska Toubale. Ŝi ja eniris la elsendo-teamon jam en 1998. Proksimume de 15 jaroj ŝi estras la nun 6-personan skipon, kiu provizas al siaj aŭskultantoj novaĵojn, interesaĵojn, literaturon, muzikon kaj multon pli.*

**Katja: Ĉu estas vi, kiu respondecas pri ĉiu laboro?**

Franciska: Feliĉe ne. Nun la membroj de la grupo estras la unuopajn elsendojn laŭvice. La aktuala respondeculo zorgas ankaŭ pri la muzikaj eroj por la koncerna programo.

**K: Kiuj estas la aliaj teamanoj?**

F: Krom mi estas Heather Heldzingen kaj Laszlo Farkas, Karlo Egger kaj Matt Englesos.

**K: Viaj aŭskultantoj jam scias, ke vi ĉiujare forestas dum proksimume du monatoj.**

F: Jes, mi vizitadas miajn familianojn (mi havas 4 infanojn kaj 8 genepojn, vojaĝas al E-aranĝoj...). Por tiu tempo mi antaŭregistras elsendaĵojn, kutime verkon de